... Alvokis AFP (*Agence France Presse*), kaj sekve de tiu longa intervjuo aperis artikolo en *L'Alsace* kaj *Le Monde*. Poste aperis artikoloj en *L'Est Républicain*, *Le Républicain Lorrain*, informo ĉe *France-Culture*, intervjuo de ĵurnalisto de *France 2*, vizito de *FR3 Alsace* en la universitato kun duhora filmado + "*France bleu*" *Alsace* (radio), kio rezultigis dufojan dissendon de 2-minuta filmeto departemente kaj regione, intervjuo de *DNA* kaj *L'Alsace* kun fotoj por *DNA* ; intervjuo de *Radio Fréquence fac*. kaj fine de *Pola Radio* !

La informoj estis taŭgaj, krom rilate kelkajn detalojn, kiujn E.L. ne elbuŝigis tiel... sed ni ne grumblu !

## ankoraŭ pli alloga !



Dank'al plua kontribuo de nia ret-spertulo  
André Grossmann, nia retejo \*\*\* ĵus riĉiĝis  
je nova rubriko  
"nos albums photos"



Post simpla alklako en la menuo,

via ekrano revivigos okultrafe regionajn eventojn, kiuj okazis en la regiono ... kaj aliloke.

\*\*\* <http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr>

Indas tuja vizito !

# LA 17-a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE KULTURO KAJ TURISMO EN PINEDA DE MAR, de la 3a ĝis la 10a de oktobro 2009

Jam la 17-an fojon renkontiĝis la verda familio en Hispanio kaj ĝuis agrablan Esperanto-aranĝon en la ĉe-mara urbeto *Pineda de Mar*, kiu situas 55 km norde de Barcelono. La Semajno estis bone organizita de la triopo: *Luis Serrano, Salvador Aragay kaj Santiago Torné*. Ĉi-jare kolektiĝis 120 samideanoj el 13 landoj. Ni havis plezuron havi inter ni geedzan paron *Norberto Díaz kaj Yoandra Rodriguez* el Kubo. Ili prezentis al ni sian urbon *Santi Spiritu* kaj invitis la ĉeestantojn partopreni la Universalan Kongreson en Kubo venontjare en julio. Ni ĝuis belan Semajnon



Inaŭgurado de la semajno kun urbaj reprezentantoj de Pineda de Mar



120 partoprenantoj ĝuis tiun internacian semajnon kaj la komforton de la Hotelo STELLA & SPA

en la agrabla etoso de la tri-stela hotelo *Stella* sekvante la programon laŭ la Semajna informilo. Ĝi estis riĉa je eventoj kaj altkvalitaj prelegoj. Dum la dimanĉo inaŭguro bonvenigis nin la urbestro de *Pineda* s-ro *Xavier Amor i Martín* kaj ĉeestis aliaj du funkciuloj de la urbo. Ni komune fotiĝis.

*Stano Marček* - la redaktoro de la revuo *Esperanto* - gvidis E-kurson laŭ sia propra instrumentado. Lia verko estas tradukita kaj eldonita jam en 23 lingvoj. Tre interesa estis prelego pri arboj de s-ro *Guillem Nicolas*. Li klarigis al ni kiamaniere tranĉi branĉojn de arboj por ne damaĝi ilin. Grandan sukceson havis ateliero pri produktado de poŝtkartoj kiun gvidis *Wolfgang Gunter*. Li asertis, ke ĉiu homo estas artisto kaj la rezultoj pravigis tion.

La premio *Ada Sikorska-Fighiera* estas ĉiujare aljuĝita al la plej meritplena persono en la E-agado. La unuan



Floreal sukcesas trinki tiun dolĉan vinon el speciala botelo "Porron"

Katalin Kováts prezentas la referencakadron de Eŭropaj ekzamenoj



fojon ĝin ricevis virino - *Katalin Kováts* konata de ni ĉiuj kiel fervora esperantistino pri instruado kaj edukado de instruistoj. Surloke ŝi disdonis diplomojn al 2 sukcesintoj en la ekzamenoj faritaj dum la UK en Bjalistoko. Ŝi ankaŭ parolis pri la nova ekzamsistemo, prezentis filmeton rememore al forpasintoj kaj tre interese kaj detale prezentis al ni nederlandan pentriston *Vincent Van Gogh*. Li estas ŝia pasio. Ni multon eksciis pri la vivo de tiu fama artisto.

Alia interesa prelego temis pri la natursciencaj vortoj en PIV fare de tre sperta fakulo pri pluraj

Muzeo pri grafikajoj







Claude Roux prelegas pri natur-sciencoj en PIV

sciencoj, sed ĉefe pri biologio - *Claude Roux* el Francio. Li okupiĝis pri reviziado de la Plena Ilustrita Vortaro. Li konsilis ke estu enkondukitaj en ĝi mankantaj fakaj vortoj, malaprobis arkaismojn. Li atentigis nin pri la bona uzado de kelkaj kutimaj vortoj. Dr-ino *Rafaela Urueña* tre serioze parolis pri la tutmonda klimatsanĝo, pri ĝiaj konsekvencoj kaj la danĝero por la tuta homaro. Ŝi klarigis, ke la ekologia sistemo malekvilibriĝas pro tiu fenomeno kaj kaŭzas katastrofojn. Iom distra estis prezento pri Venezuelo fare de *Liba* (folklore vestita) kaj *Floreál Gabalda*. Ili prezentis serion da bildoj kaj du filme-tojn. La ekspozicio de kelkaj artaĵoj, libroj, muzikiloj, kaj gustumado de *gojav*-dolĉaĵo kompletigis tiun plaĉan prezenton.

Dum la renkontiĝo ne mankis vesperaj programeroj. En du interkonaj vesperoj ni gustumis ĉampan-vinon kaj bongustaĵojn interbabilante kun konatuloj kaj novuloj. Dum alia vespero estis prezentita la opero *Nabucco*. Dum debato, la temo "Ĉu la estonteco de Esperanto troviĝos en Afriko" estis multe pridiskutata. *Luis Serrano* ankaŭ gvidis vesperon en kiu oni rajtis esprimi siajn opiniojn pri la Semajno, doni ideojn aŭ plendi. Sed estis ĉefe pozitivaj kaj laŭdaj vortoj. La plej ŝatata programero okazas ĉiam la lastan vesperon. Ni ĝuis muzikon de la konata ensemble "Montjuic" kaj gustumis "cremat". Ĝi estas kataluna specialaĵo el spicita kaj bruligita rumo.

La tri ekskursoj konatigis nin kun aliaj partoj de Katalunio. La unua, duontaga celis laŝtonan urbeton *Peratallada*. La dua, aŭto-muzeon en *Sils*. Impresis vastega kolekto da malnovaj aŭtomobiloj. Ĉiuj eksponaĵoj laŭdire estas funkciantaj. La tultaga ekskurso gvidis nin al la urbo *Terrasa*, kie ni vizitis muzeon pri Sciencoj en Katalunio. En la urbo *Moia* ni haltis ĉe la strato Esperanto kaj trarigardis privatan biblioteko-muzeon de *Ramon Molera*. Poste ni vizitis muzeon pri la historio de Katalunio.



La strato estas inundita, ĉu tamen eblos ekskursi? La aŭtobuso jam staras trans la strato kaj atendas



En aŭtomobila muzeo de Terrasa, tiu aŭtomobilo kun la surskribo "Ville d'Epinal"

Preparado de "cremat" fajro-bruligita rumo kaj spicoj, okaze de la lasta adiaŭa vespero

*Liba Gabalda*

Muzikas la ensemble "Montjuic" kaj gajas la etoso inter la partoprenantoj



Fotoj: Liba, Andreo kaj ties komputilo



## Esperanto en Obernai

Dum la semajnfino de la 12/13-aj de septembro okazis en Obernai (Bas-Rhin) la imponega foiro BIO-BERNAI. Multegis la naturaj produktoj. Inter ili estis tre videbla la ekologia lingvo ESPERANTO.



Deĵoris membroj de la Esperanto-grupo de Strasburgo.

Sur la fotoj videblas Bruno FLOCHON, Cyrille HURSTEL kaj Fabien TSCHUDY. Ne mankis la intereso de la vizitantoj. Espereble la rikolto estos fruktodona por la strasburga grupo.

Edmond LUDWIG.

## esperanto France-Est

Présentation

Sommaire

La langue internationale

Cours par correspondance

Groupes Locaux

Aktiveco de Nancy 54 en  
majo 2009

Nos albums Photos

Nia bulteno La Informilo

Photos de Nancy: Mois de  
l'Europe

Mulhouse-Espéranto

Nia retejo: <http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr/>

ricevis iom da modifoj ĉe la menuo. La diversaj fotoj estas nun alireblaj per alklako de **Nos albums Photos**.

Poste aparta menuo proponas la fotojn laŭ jaro kaj dato. Sufiĉas alklaki.

Kompreneble mi volonte ricevas viajn rimarkojn kaj sugestojn pri la teksto, pri la ligoj, pri eventualaj problemoj ktp.


Aliflanke mi bezonas vian helpon por regule aktualigi la informojn, kiuj rilatas al lokaj grupoj.

Bonvolu okulumi al **Groupes locaux** kaj kontroli ĉu la informoj pri via grupo daŭre aktualas. Plej oportune, vi kopi la nunajn informojn pri via grupo al via mesaĝo. Tie vi povas korekti la informojn kaj sendi la mesaĝon al mi.

Ankaŭ informu min, se iuj informoj estas tute kadukaj, por ke mi simple forigu ilin.

La valoro de retejo dependas de ties konstanta aktualigo. Mi dankas vin pro via helpo kaj kunlaboro.

André Grossmann



Historia romano taŭga por junuloj kaj plenkreskuloj:

**Paolo, la Lernanto de Leonardo da Vinĉi.**

Aŭtoro: Hans Ulrich,

tradukistino: Benata Hengstmengel-Koopmans, Nederlando (eldonita okaze de la UK en Roterdamo 2008).

Temas pri streĉa historia romano, kiu rolas en la Itala urbo Florenco en la 15a jarcento.

Prezo 9,90 eŭroj + afranko 1,70 = 11,60 eŭroj

Libro mendebla ĉe nia kasito:

**Espéranto France-Est CCP 1997 72W NANCY**

## Alkongresa karavano paŭzis en COLMAR.

Merkrede la 22-an de julio grupeto de samideanoj de Mulhouse-Esperanto (Michel BASSO, Bernard BEHRA, André GROSSMANN kaj Edmond LUDWIG), alveturis la hotelon LES BALLADINS en COLMAR, kie tranoktis la partoprenantoj de la karavano celanta la UK-on en Bjalistoko.

Pro malsano, la organizanto, Jean HENIN, ne povis kunveturi, sed la tuto estis majstre organizita de lia edzino. Kelkaj partoprenantoj akompanis la lokan kvaropon al tipa restoracio, kie ĉiuj frandis regionajn specialaĵojn spicitajn de vigla babilado en Esperanto. Estis tre agrabla vespero !



Edmond LUDWIG

## Aktivecoj de Mulhouse-Esperanto



**BÉDÉCINÉ  
2009  
ILLZACH**



En novembro 2009, nia grupo Mulhouse-Esperanto partoprenis du manifestaciojn por prezenti Esperanton.

En nia kulturdomo Espace 110 en Illzach okazas ĉiu-jare en novembro impona ekspozicio pri bildrakontoj, nomata **Bédéciné**. Tie eblas akiri ege diversajn bild-rakontojn, novajn, malnovajn kaj ricevi la subskribon de famaj aŭtoroj kaj eble eĉ tute personan desegnaĵon. Fakte multaj homoj tie viciĝas kaj ĝenerale la publiko estas vere abunda. La 14an kaj 15an de novembro 2009 refoje okazis tiu grava evento. Tia-okaze nia grupo havis tablon, informis la publikon pri Esperanto, disdonis la kalendareton 2010 kaj la

prospektojn "Langue Equitable.", vendis libretojn Poŝamiko. Luj kolektantoj eĉ pretis akiri bildrakontojn en Esperanto. Ni sukcesis vendi kelkajn, ĉefe de Tinĉjo.



En la vilaĝo Ungersheim je 15 km de Mulhouse okazas ĉiu-jare en novembro festivalo pri Ekologia kaj justa komercado, nomata ĉi-jare **ECO/EQUITABLE**.

La 21an kaj 22an de novembro 2009 okaze de la ĉi-jara festivalo, nia grupo refoje propagandis pri Esperanto. Al nia tablo venis multaj homoj pro scivolemo. Luj jam sciis ion pri la lingvo kaj deziris akiri pli da informoj, aliaj nenion sciante mire malkovris, kio estas Esperanto kaj akceptis niajn klarigojn. Ni sukcesis vendi la libretojn Poŝamiko kaj la DVD Esperanto Elektronike.

Ni dankas aparte al Simone Kiry, kiu iniciatis nian partoprenanton, kaj ĉiuj, kiuj akceptis tie deĵori, nome Jacques Pineda, Simone Kiry, Frédéric Porretti, Roberto Kueny kaj André Grossmann.





OMAĜO al DANIO per

BONJOUR, VOISIN !

Okazis la kvina aranĝo « Bonjour, voisin ! », la 21-an de novembro 2009 en la urba mediateko. La temo pritraktis Danio-n.

Ĉeestis pli ol tridek personoj. Inter ili gesinjoroj Ludwig Edmond kaj Henriette.

La parton « geografio kaj turismo » ilustris bilda disvolviĝo per « powerpoint » ; historio ampleksis la epokon vikingan ĝis la nuntempa aliĝo de la lando al Eŭropunio ; literaturan parton beligis legaĵoj el verkoj de Ove Abilgaard (poeto), Karen Blixen (verkistino), Søren Kierkegaard (filozofo) kaj Hans Christian Andersen, la fabelisto.

Dufoje po jaro la grupo prezentas landon de EU. La prezento aspektas kiel omaĝo al kuncivitana popolo. Esperanto tiel aperas ne nur kiel lingva afero, sed emo de praktika klopodo por plia interesiĝo al la eŭropa komuneco.

La lasta baloto pri elekto de eŭropaj parlamentanoj permesis pesi la amplekson de seninteresiĝo al la nova kontinentvasta bonfarto. En kelkaj landoj nur 20% uzis la balotujon !

« Bonjour, voisin ! » arigas publikon, kiu interesiĝas pri translimaĵoj. La literatura parto estas aprecata de legemuloj membriĝantaj al la mediateko.

BONJOUR  
VOISIN !



\* ESPERANTO SARREGÜEMINES \*

Tia kunveno disvolviĝas laŭ jena programo:

- geografia kaj turisma prezentoj de la lando, far Armand HUBERT;
- historia parto far faka instruisto ;
- literatura alpaŝo, dank'al verkistoj : deklamado far aktorino;
- ekspozicio de verkoj kaj KDj far mediateko kiu reklamas por la komuna aranĝo.

## REMEMORAĴO :

Danojn ni ja konas de longe. Ĉu ili ne invadis nian landon kaj terurigis niajn praavojn dum du jarcentoj? Timindaj vikingoj !

Nuntempaj Danoj forpelis armilojn kaj ŝildojn. Sed kiel indaj vikingaj posteuloj, ili plueblas konkeremuloj kaj dinamikaj volontuloj. Ili ĉampionas en diversaj specifajoj, kiel en socia progreso kaj civitaneca egaleco. Ili postulemas komforton kaj higienon. Ili sin montras majstroj konstruante gigantajn pontojn kaj pioniras en la kampo de naturdefendo.

Eĉ vikingan ŝategon de biero ili ŝajne daŭrigas !  
(*notu* : En øl tak ! : bieron, bonvole !)

Ili forvendas elstaran bieron, la « Carlsberg-an ». « Lego-briko » konkeris unuan rangon inter ludiloj. « Design-stilo » estas dana deveno.

Se vi intensas vojaĝi tien baldaŭ, ne forgesu, ke iu atendas vin en la haveno de Kopenhago (sur roko).



## KLUBA VIVO

Kvin personoj brakumis ekstudon de Esperanto per dek-leciona metodo. Elŝutaĵoj el la Reto nutras la scivolemon de tiu juna skipo, kiu estas esperig-plena. Gvidas samcelano Christian Freyburger. La lernoĉambro vojaĝas de unu domo al alia laŭvole de la partoprenantoj.

*De Ove Abilgaard el « Mateno en Sjælland »*

Najtingalo

Silvio

Turdo

Paseroj subbarbare kantetantaj.

Meze de ĝojeganta ĥoro

Mi vekigiĝas.

Kolombaj amindumoj

Kornikaj grakantoj

Mevaj kriadoj

Kaj motora batado elfone eĥanta

de maren vojirantaj fiŝboatoj.

Kaj kiel marhirundo

Mi plonĝas perkape

En la abisma memoro

Kaj elmergiĝas enbekante ... infanecon :

Jen la varmo de la stalo kun ĉevaloj

Kaj la timo ricevi baton de malantaŭa gambo.

La admiro por la hufforĝisto

kiu prenas ĝin sur siajn genuojn.

...

Arbaroj de varmetaj alĝoj ĉirkaŭ la gamboj

Densaj aroj da salikokoj

Pikadoj de gasterosteoj

Kaj tiuj ruĝaj kraboj flankenkurantaj sur kolonoj.

La kareso de la maro kaj ties spiro sur la vizaĝo.

La sablo de dezertaj dunoj

Tra la fingra sablorhorloĝo.

## Mia deĵorado en "Festival des Peuples" ——— ☆



Rumanio, aŭ pri esperanto; venis pli multaj dimanĉe.

Cetere mi ricevis bonvenan helpon, de Edmond Ludwig kelkajn horojn sabate, kaj de Simone Kiry la tutan dimanĉon, tial ni povis alterni ĉe la budo kaj viziti la aliajn ekspoziciojn, spektaklojn kaj koncertojn, ankaŭ frandi la bongustajn manĝaĝojn de la festo. Suno brilis konstante.

La deĵorado plaĉis al mi, ĉar mi faris interesajn renkontojn kaj havis kelkajn bonajn surprizojn, iom tro longaj por rakonti. La plej ne-atendita estis la vizito de instruistino pri la angla lingvo. Ŝi restis relative longan tempon, volis scii ĉion pri la gramatiko, ekzercadis en konstruado de frazoj per ludo de moveblaj elementoj, kaj provis traduki kelkajn partojn de libroj. Ŝi komprenis du trionojn de la frazoj, kvankan ŝi neniam renkontis esperanton en sia vivo (sed ŝi jam konas la francan, la anglan, la hispanan kaj iom la germanan). Tiu sukceso en traduko tre ĝojigis ŝin !

Ŝi mem prezentis spektaklon kun siaj lernantoj, triono de la prezentado en la angla lingvo ( *Romeo kaj Juliette* moderne kaj fantazie adaptita de ŝi kun ili... ). Ŝi havis grandan meriton, ĉar orkestro ludis tre laŭte apud la tendego, kaj la adoleskantoj ludis stoike sen perdi dinamismon. Ili "surpodiumis" kvarfoje en la du tagoj, spektaklo preskaŭ neniam en silenta etoso, kiu tamen bone sukcesis interesi la publikon.

En tiu festo deĵoris multege da bonvolaj helpantoj, efikaj kaj afablaj.

Ĉiuj el ili, kaj ankaŭ la prezentistoj de diversaj aranĝoj, estis ege simpatiaj homoj, helpemaj, kaj mi kreis kun ili bonajn reciprokajn ligojn de simpatio. La plej interesaj personoj venis ĉe la fino.

Certe okazos kelkaj sekvoj el la grajnetoj semitaj.

Ginette MARTIN

## ... Alloga, ekzotika, multfaceta ! Jes, indas enpartopreni !...

Se vi ŝatas sperti ion novan kaj interesan, agrable pasigi tempon en Eo-komunumo, do aliĝu al formiĝanta grupo de vojaĝantoj **al Mongolio**.

Junie 2010 estos efektivigita E-karavano tra Rusio, survoje al la **6a Azia E-Kongreso en Ulanbatoro**. Partoprenontojn de la karavano atendas konatiĝo kun vidindaĵoj de *Moskvo* kaj/aŭ *S-Peterburgo*, *Irkutsk* kaj *Bajkal-lago*, vizito al spektakloj de rusa baletoj kaj cirko. Alloga pertrajna vojaĝo tra eŭropa kaj azia partoj de la lando ebligas ekkonscii pri vasteco de Rusio, kaj eble efektiviĝi vian delongan revon. . . veturi longdistance ( pli ol 5000 km ) laŭ unika fervojo, kiu aspektas kvazaŭ

parto de "surtera ponto", kiu komenciĝas ĉe bordo de Pacifiko kaj finiĝas ĉe Atlantiko !

Pliajn informojn vi povas ricevi en [www.eventoj.hu](http://www.eventoj.hu) ( *internacia kalendaro* de E-vojaĝoj, junio 2010 ) kaj en [www.mongolio.info](http://www.mongolio.info) en la rubriko *Azia kongreso*, E-karavano tra Rusio.

La vojaĝon organizas Tatjana Loskutova, UEA-delegito en Ivanovo, Rusio, [lota49@mail.ru](mailto:lota49@mail.ru), kiu dum pli ol 10 jaroj E-instruis en Gresillon.



## Kubanoj en Vogezoj

Saulxures-sur-Moselotte kaj Gérardmer (21 / 24ajn de oktobro 2009)



Grandan ĝojon !... Mi bonvenigas Yoandran kaj Norberton ĉe la staci-domo de Kruth. Longa trajn-vojaĝo ek de la envagoniĝo en Riom. Jam noktas.

Ambaŭ jam turneas en Eŭropo ekde la 19a de septembro. Tamen, malgraŭ multaj renkontoj de homoj, malkovro de multaj urboj, vilaĝoj, pejzaĝoj, ili gapos al ĉio kun freŝa rigardo, kvazaŭ temus pri la unua tago. Ili ŝatos ĉion, gustumos ĉion, interesiĝos pri ĉio.

Por Yoandra, jen la unua vojaĝo ekster Kubo. Norberto spertis dektagan vojaĝon en Montpellier en 1998, do ankaŭ li estis preskaŭ virga koncerne la konon de Eŭropo.

Tre agrablaj estis por mi kaj por ili la trinokta kaj dutaga restado. Preskaŭ seninterrompaj babiladoj kaj reciprokaj informoj pri la vivo en Kubo kaj pri la ĉi-tiea, en Vogezoj.

Kompreneble ankaŭ okazis pied-promenadoj en Saulxures kaj sur la rando de la lago en Gérardmer.

Tre fortaj momentoj dum renkontoj kun grupoj. En la teknikan lernejon de Saulxures venis du klasoj de gejunuloj kaj kelkaj adoltoj. La publiko estis tre atentema, eĉ la kutime bolanta junularo estis kaptita de la fotoj, filmetoj,

komentoj, kiujn Norberto prezentis ! Ankaŭ la deklamado de poemo far Yoandra tre plaĉis.

Poste abundis diversaj demandoj, ankaŭ el la gejunuloj. Norberto kaj Yoandra ne laciĝas respondi; ju pli da demandoj, des pli da intereso de la publiko por Kubo... Tre afable respondas la gastoj. La plej interesataj personoj restis plian momentojn, kaj mi mem ne laciĝis traduki.

En Gérardmer, ni unue ĝuis festeneton ĉe la klubanino Henriette. Ĉiu el ni alportis frandaĵojn, regis ege bonega etoso. Poste programiĝis prezentado de Kubo en la loka kultur-domo. La publiko estis iom malpli multnombra kaj malpli juna ol en Saulxures; tamen plejparte ili jam spertis en la lingvo, do ofte komprenis la diritaĵojn antaŭ mia traduko, pro tio ili ĝuis ricevi dufoje la informon ! La demandoj longe daŭris kaj estis nekredeble variaj, mi mem eksciis pri aferoj, kiuj ne estis aluditaj ĉe mi, eĉ post du tagoj da senĉesa babilado.

Rakonti pri Kubo estus tro longe. Ĉefe interesis min la fakto, ke ili daŭre vivas en komunisma sistemo, kun la avantaĝoj kaj la malavantaĝoj. La senlaboreco ne ekzistas. Ĉiu familio ricevas en januaro kajereton kun preskribo de la manĝoj aŭ bazaj produktoj, kiujn ili rajtas ricevi laŭ tre malmultekosta prezo, t.e. preskaŭ senpaga; pro tio, neniu vere mortmalsatas en Kubo... Tamen, ofte je la mezo de la monato, la nombro da krucoj sur la kajereto montras neeblo de la rajto peti pli multe, kaj devas sekvi aĉeto pli kosta ĝis la fino de la monato. Aliflanke, la listo de bazaj produktoj skribitaj sur la kajereto ne donas grandan variecon en la menuo. Siaflanke instruado kaj san-servoj estas bone zorgitaj kaj senpagaj.

Eliri el Kubo por vojaĝi eksterlanden praktike eblas, nur kontraŭ invito de iu eksterlandano... kaj permeso de la registaro.

Je mia demando... *"Do, kion utilas Esperanto, se vi ne povas eliri el via lando, nek posedi inter-reton ?* ( nur entreprenoj povas retumi, ankaŭ post permeso de la registaro ).

- *Por eskapi rutinon. Jam bone vojaĝi en nia propra lando, de unu grupo al alia grupo"*

En popolo, kiu atingas preskaŭ 11 milionojn da loĝantoj, la esperanto-movado estas tre vigla. 700 personoj pagas kotizon. Tio estas bela rezulto, en lando, kie oni havas monon nur por vivteni sin. Norberto kaj Yoandra povas profiti tiun vojaĝon nur pro kolekto de mono fare de la eŭropaj amikoj kaj esperanto-asocioj. Ili ne ricevis monon de Kubo...

La homoj, kiuj deziros gastigi en la lando, ricevos vizon senprobleme kaj rapide, ( prezo: proksimume 30 eŭroj ). Ĉiuj fremduloj estas varme bonvenigitaj, ĉar tiu tre alloga insulego vivas parte dank'al turismo.

Indas viziti Kubon !

Ginette MARTIN



5 / 7 - 3 - 2010

... indas enpartopreni ! ...  
67<sup>a</sup> Regiona Staĝo de Esperanto  
nepre aliĝu !

franca versio elŝutebla el nia retejo  
version française à télécharger sur notre site  
<http://esperanto.alasacelorraine.perso.neuf.fr>



FR-54500  
VILLERS-lès-NANCY

## Espéranto-France a un site internet rénové



Grâce à un important travail effectué par Emmanuelle Richard, sitemestre des sites de *JEFO*, *Francilio*, *ikurso*, le site rénové a pu être mis en ligne le 1er novembre 2009.  
<http://esperanto-france.org>

Ce site, par son système collaboratif, peut être mis à jour de façon plus dynamique que le précédent. En effet, plusieurs personnes peuvent y contribuer, sans connaissances techniques trop poussées. Le site pourra ainsi être actualisé plus souvent et être plus vivant.

La partie en espéranto est à compléter. L'aide de traducteurs bénévoles est la bienvenue. D'où la rédaction de cette annonce en français. Nous espérons que ce site, plus dynamique, plus clair, plus jeune, vous plaira.

Pour devenir contributeur ou pour toute question, remarque, suggestion sur le site écrire à :  
[retestro@esperanto-france.org](mailto:retestro@esperanto-france.org)

En direct du siège ... 4bis rue de la Cerisaie ! ...

A tous les membres d'*Espéranto-France*, l'équipe du siège souhaite une excellente rentrée.

Crise ou pas, quand on appartient à une association dont le nom symbolise l'optimisme, on se doit d'être positif. Sachez que pour le siège, il n'y a pas eu rentrée, en nous organisant et en nous relayant, nous avons pu maintenir le siège ouvert pendant l'été, le « *4 bis rue de la Cerisaie* » a fonctionné comme le reste de l'année.

Ainsi ont pu être accueillis divers visiteurs :

- des curieux venus s'informer (certains sont déjà revenus. Qui sait ? Peut-être de futurs adhérents) ;
- des espérantistes de différentes régions en visite dans la capitale ;
- des espérantistes étrangers : *un Japonais, une Australienne d'origine russe, une Américaine d'origine iranienne, un Espagnol,*
- *trois Brésiliens ...*

Mais au fait, "l'équipe du siège"... qui sait vraiment ce que représente cette expression ? Il semble que pour beaucoup, il s'agisse de mystérieux "ils" que l'on charge volontiers de toutes les responsabilités et de tous les péchés.

- Alors voilà : autour de notre coordinatrice *Susanna*, on trouve le responsable du libro-servo *Jean-Louis Pouillet* et cinq ou six bénévoles, *Jean-François, Hélène, Liliane, Anne-Marie, Méline*, que vous pourrez rencontrer ou entendre en fonction de leur jour de présence, de vrais bénévoles qui donnent gratuitement de leur temps... Et en sont parfois de leur poche !

- En trois mois d'été, cette modeste équipe a établi plus de 150 factures, dont beaucoup correspondent non à des achats sur place, mais à des envois en France ou à l'étranger (ainsi nous avons expédié trois commandes en Afrique : Burundi, Bénin, Côte d'Ivoire.

- Préparer des commandes, établir des factures, faire les paquets, les timbrer, les porter à la Poste, autant de tâches modestes mais indispensables.

- Ajoutez à cela, toute la gestion administrative, les centaines de courriers reçus et envoyés par internet ainsi que par lettre, les demandes de renseignement par téléphone... et vous conviendrez que l'équipe n'a pas le temps de s'ennuyer.


- Ainsi l'équipe du siège a-t-elle le sentiment d'avoir fait œuvre utile.

Sachez aussi que vous serez toujours les bienvenus : la porte du siège vous est ouverte. Connaissant mieux l'équipe, vous comprendrez mieux ses problèmes et lui pardonneriez plus facilement quelques inévitables carences. Et qui sait ?... peut-être aurez-vous envie de participer un jour à ses efforts ? !

C'est la première fois que nous nous adressons ainsi à vous. Nous aimerions connaître vos réactions, vos suggestions, vos conseils. Ecrivez-nous : 4 bis rue de la Cerisaie - 75004 Paris ou [info@esperanto-france.org](mailto:info@esperanto-france.org)

D'avance à tous, merci !





## Elekto de novaj UEA-gvidantoj

En 2010 okazos elekto de novaj gvidorganoj de UEA por la periodo 2010-2014 de tio estos elekto de komitatanoj B por reprezenti la individuajn membrojn (Komitato de UEA. Laŭ la Statuto (art. 24) oni elektas unu komitatanojn B komencita milo da IM. Laŭ la antaŭvidata nombro de IM je la 31-a de decembro elektos ses komitatanojn B.

La Ĝenerala Regularo (art. 8) preskribas: "Dek individuaj membroj el minimume tri diversaj regnoj rajtas proponi kandidaton el inter la individuaj membroj. Al la proponoj, subskribitaj de la proponintoj, devas esti aldonitaj, krom konsento de la kandidato, ankaŭ biografieto kaj deklaro pri la movadaj celoj de la kandidato, kiuj kune ampleksu maksimume 150 vortojn."

Kompletaj proponoj atingis la Centran Oficejon de UEA en Roterdamo ĝis la 28-a de februaro 2010. Validaj estos nur tiuj dokumentoj kun originalaj subskriboj (t.e. ne telefaksoj aŭ retmesaĝoj).

Ĉiu kandidato devas esti IM de UEA dum du jaroj antaŭ la elekto (t.e. 2008 kaj 2009) kaj resti IM tra la tuta oficeja periodo. Salajrata oficisto de UEA ne rajtas esti komitatano. Komitatano, kiu persone ĉeestis nenium komitatokunsidon en la periodo 2004-2009, ne estas reelektebla.

Se ne estos pli ol ses validaj kandidatoj, oni konsideros ĉiujn elektitaj. Se ili estos pli multaj, la individuaj membroj voĉdonilon por elekti siajn reprezentantojn per poŝta balotado.

*Osmo Buller*

Ĝenerala Direktoro de UEA



De du semajnoj, UEA troviĝas en la socia retejo *Facebook* [*fejsbuk*; 'vizaĝ-libro'], ĉi-momente jam kun 523 "ŝatantoj". Notindas, ke la ĝenerala grupo "Esperanto", kiu ekzistas de longe, ekde 2004, atingis tagoj superos la nombron de 6000.

Jen kelkaj statistikaĵoj pri la niĉo de UEA en *Facebook*, kaj komparoj kun la individua membraro de UEA.

La 12 plej grandaj landoj en la UEA-grupo de *Facebook* estas:

1 - Usono (71), 2 - Italio (38), 3 - Brazilo (36), 4 - Ĉilio kaj Francio (po 30), 6 - Germanio (19), 7 - Hispanio kaj Meksiko (po 18), 9 - Belgio (15), 10 - Britio kaj Nederlando (po 14), 12 - Danlando (13).

Inter ĉiuj individuaj membroj: 1 - Francio (602), 2 - Germanio (532), 3 - Japanio (401), 4 - Brazilo (378), 5 - Usono (378), 6 - Nederlando (245), 7 - Pollando (244), 8 - Italio (195), 9 - Rusio (164), 10 - Belgio (154), 11 - Britio (146), 12 - Hispanio (146). Ĉilio kaj Meksiko elstaras en *Facebook*; en la tuta membraro ili estas respektive 55-a kaj 43-a; Danlando estas tie la 12-a.

Distribuo laŭ aĝo kaj sekso en *Facebook*:

Aĝo: Vira + Ina	< 31:	8 %
13-17:	2 + 0 = 2%	31-40: 7 %
18-24:	13 + 6 = 20%	41-50: 12 %
25-34:	18 + 8 = 26%	51-60: 16 %
35-44:	14 + 2 = 16%	61-70: 20 %
45-54:	13 + 5 = 18%	71-80: 16 %
55 > :	12 + 4 = 16%	81 > : 9 %
Ĉiuj:	72 + 25 = 97%	ne konata: 12 %

Aĝo de 3% ne estas konata. Nur kvarono estas virinoj, dum inter la individuaj membroj ili estas triono (65% viroj, 4% sekso ne konata).

La *Facebook*-grupo estas pli juna ol la individua membraro. Mi ne disponas nun pri nombroj laŭ la grupigo de *Facebook* kiel la supra (dekstre) tabelo montras, el tiuj, kies aĝo estas konata, duono estas pli ol 60-jaraj, dum en la *Facebook*-grupo duono aĝas malpli ol 35 jarojn:



## LA FILMA OFERTO DE UEA PLIVASTIĜIS



La 6-an de oktobro aperis la 5-a numero de la filmĵurnalo *UEAviva* kun tri eroj. Unue Emilio Cid raportas pri la rezultoj de la informkampanjo ĉirkaŭ la 94-a UK en Bjalistoko, al kiu li alvokis laŭ komisiono de la Estraro de UEA en la filmĵurnalo en majo. Cid estas sufiĉe kontenta pri la rezultoj kaj instigas plu daŭrigi la agadon ankaŭ nun, kiam la UK jam apartenas al pasinteco.

En la dua ero, pruntita el la televida servo de UN, oni vidas elpaŝon pri lingvaj rajtoj fare de la UEA-representanto Mireille Grosjean ĉe la Homrajta Konsilio de UN fine de septembro. La fina parto estas dediĉita al TEJO. Oni vidas sinprezenton de la nova Estraro de la junulara sekcico de UEA en la ĵusa ARKONES en Poznano, Pollando.

La reta kinejo de UEA ĉe *Ipernity* pliriĉiĝis per valoraj historiaj dokumentoj. La filmo "*Lingvo festis naskiĝtagon*" de Michael Cwik raportas pri la impona UK de la Jubilea Jaro 1987 en Varsovio. Scenojn el la Budapeŝta UK en 1966, i.a. kun fragmento el la festparolado de Ivo Lapenna, montras la filmo "*Esperanto-fonto*", kiu unuavice rakontas pri la eventoplana historio de nekutima ZEO apud la hungara ĉefurbo.

La plej lasta el la novaĵoj en la reta kinejo estas samtempe la plej malnova el ili, nome dokumenta filmo pri la 48-a UK en Sofio en 1963. Ĉiuj ĉi trezoraĵoj devenas el la Biblioteko Hodler, kies filmojn UEA iom post iom ciferecigas por pli facile disponebligi ilin al la movada publiko.

La adreso de la reta filmĵurnalo en *YouTube* estas

<http://www.youtube.com/user/UEAviva>

kaj tiu de la reta kinejo en *Ipernity*

<http://www.ipernity.com/home/97850>.

# MEDITERANEA ESPERANTO-SEMAJNO - 2010

**27-a februaro ĝis 6-a marto 2010 Agay - Francio - Lazura Marbordo**

**Se ankoraŭ frostas en via regiono, venu al la Mediteranea Maro, kie floras mimozoj kaj migdalarboj. Vin atendas amika, familia etoso, belegaj pejzaĝoj, bona ripozo kaj lazura maro!!!**



Vi povas plibonigi vian nivelon de Esperanto partoprenante en kursoj  
 Gvidantoj de kursoj estos:  
 1a Kurso: Rafael MATEOS  
 2a Kurso: Malcom JONES  
 3a Kurso: Waldemar LIPOWICZ

Posttagmeze, vi mem elektos vian programon: promenado, piedirado en montaro Esterel (kunportu viajn marŝŝuojn), familia vivo ĝis la vespero. Distraĵoj. La studejo estas komforta hotelo "Le Renouveau" en Agay (ĉe Saint-Raphael). Francio

## INFORMOJ KAJ ALIĜOJ

Monique PRECIOZO, 92 impasse Jean Moulin, FR 83700 SAINT-RAPHAËL, Francio.

rete : [prezmoni@hotmail.com](mailto:prezmoni@hotmail.com)

tel : 0033 (0)4 94 83 06 88

à Christine GRAISSAGUEL, Les Iles d'Or, rue du progrès, FR 83600 FREJUS, tel 0033(0)4 94 95 68 18

El la komitato de Espéranto-France

Por informoj al la asocio ...



Okazis komitatkunveno la 27an de septembro 2009 en Parizo ĉe la sidejo. Malmulto precize koncernas nian federacion, sed ĝeneralaj informoj gravas. Pro troa profesia laborŝarĝo, Xavier Dewidehem rezignis pri sia posteno.

Novan estraron oni elektis :

- prezidanto kaj kasisto : Aleks Kadar
- sekretario : Véronique Bichon
- vic-prezidanto pri kulturo : Axel Rousseau
- vic-prezidanto pri eksteraj rilatoj : Cyrille Hurstel
- estraranoj : Armelle, Xavier Dewidehem

Tio ne multon ŝanĝos por viaj rilatoj kun UFE. Aleks plu zorgos pri financoj, kaj mi zorgos pri la rilatoj kun la komitato.

Fine de oktobro, aperos la TTTejo per SPIP anstataŭ la nuntempa. Eĉ se ĝi ne estas tute ĝisdatigite, ni decidis tion ĝuste por instigi homojn ĝisdatigi la paĝojn. Okazos kelkaj monatoj da konfuzo, sed se estu bonvena se vi emas helpi Espéranto-France transiri al sistemo per kiu ĉiu povos publikigi artikolon.

La aliĝilo pretas je la fino de septembro, kaj vi baldaŭ ricevos ĝin per « *Le monde de l'espéranto* », kaj vi povos tiel subteni samtempe Espéranto-France **kaj la orientan federacion**, kiu profitas pri parto de via kotizo.

Pri ekzamenoj, Anne Jausion, direktoro de la ekzamenoj ĉe FEI, prezentis statistikojn :

Ekzameno	Kandidatoj	Sukcesintoj
1a grado	72	65
2a grado	20	20
Atesto pri supera lernado	1	1
Kapableco pedagogio	4	3

Se vi deziras oportune profiti okazaĵojn proksimajn de la orienta regiono de Francio, memoru ke :


- okazos sesio de ekzamenoj laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadron pri Lingvoj dum Novjara Renkontiĝo en Saarbrücken inter kristnasko kaj novjaro.
- okazos sesio de francaj FEI-ekzamenoj dum la nacia kongreso **okzonta en Kaiserslautern (D)**. Anoncu vin frue
- **venu al Kaiserslautern**, se vi volas ĝui nacian kongreson kun la germanoj.

Via reprezentanto ĉe la komitato de UFE, *Cyrille Hurstel*

cyrille.hurstel@free.fr

0950 57 68 00

## La vortaro ————— ☆



Karaj abonantoj,

... 6000 pliaj vortoj estis aldonitaj al la *Brazil-Portugala vort-listo* dank'al la laboro de *Profesoro Aguinaldo PETRIN*, kiu jam kontribuis antaŭ kelkaj jaroj al la plivastigado de tiu listo, kiu nun enhavas pli ol 33 000 vortojn..

**GRATULEGON KAJ DANKEGON AL LI !**

Vi povos elŝuti la novan vortliston je la kutima adreso :

<http://www.la-vortaro.net>

Kiam vi instalos la novan vortliston, la malnova estos aŭtomate anstataŭigita..

Dank'al nia re-akirilo vi retrovos viajn proprajn aldonaĵojn.

Bonan elŝuton! *Bernard(o)*

Claude Hagège : *Pour la survie de Babel*"" Le Devoir " - Caroline Montpetit - 21 novembre 2009 - Livres


Il a du bagout, le linguiste Claude Hagège. En entrevue, il pose à la fois les questions et les réponses, semble pouvoir parler durant des heures de son principal sujet d'étude, qui lui vaut ces jours-ci de signer un livre dans la très belle collection des dictionnaires amoureux, qui paraît chez Plon/Odile Jacob, *Le dictionnaire amoureux des langues*.

L'homme, qui est l'un des invités d'honneur du *Salon du livre* de Montréal, sait de quoi il parle. Polyglotte, il a voyagé de par le monde pour comprendre et traduire des langues tribales jusque-là méconnues. Pour lui, toutes les langues sont belles, parce que toutes peuvent exprimer la diversité du monde. En principe. Car s'il y a une langue que le professeur Hagège attaque, **c'est bien l'anglais**. Et il l'attaque entre autres parce que cette langue, **par son hégémonie**, est en partie responsable, avec l'espagnol, de la disparition de quelque 25 langues par an de la surface de la Terre. Une langue disparaît, explique-t-il, quand il y a faute de transmission aux enfants de ses locuteurs, et quand ses locuteurs, devenus vieux, sont sur le point de mourir. Et la disparition d'une langue, c'est aussi la disparition de l'expression d'une culture. L'anglais, il l'attaque aussi parce que **c'est la langue des pays industrialisés**, les États-Unis, le Canada, la Grande-Bretagne, la Nouvelle-Zélande, l'Australie, l'Afrique du Sud. Or, plutôt que de traduire les mots liés à la technologie que l'on importe de ces pays, ou encore d'inventer de nouveaux mots qui leur correspondent, on se contente souvent de les importer dans notre langue. Il est pourtant toujours possible pour une langue d'inventer de nouveaux mots pour s'adapter à un nouvel environnement. Il salue d'ailleurs les efforts du Québec en la matière, et accueille un mot comme **courriel**, tellement juste, en traduction de **l'anglais e-mail**.



## Espéranto

Car Claude Hagège, qui a souvent dû utiliser d'abord une langue véhiculaire avant d'apprendre la langue d'un peuple auquel il s'intéressait, reconnaît bien la nécessité pour les peuples d'utiliser parfois une langue commune. En fait, il regrette qu'une langue comme l'espéranto, qui visait précisément à créer un langage commun pour permettre la communication entre les peuples, ait été supplantée par l'anglais, à la faveur du rôle des Américains dans les deux grandes guerres mondiales qui ont déchiré l'Europe au XXe siècle. **L'espéranto n'est pourtant pas mort**, dit-il. En fait, selon *Wikipedia*, il compte de un à deux millions de locuteurs de par le monde. Mais il ne remplit manifestement pas les objectifs que lui avait fixés son inventeur, l'ophtalmologue juif polonais Ludwik Lejzer Zamenhof. Pourtant, **contrairement à l'anglais**, l'espéranto n'exprimait pas l'influence de tout un peuple, en l'occurrence le plus puissant, sur l'ordre mondial.




Ce qui n'exclut pas, bien sûr, que les langues aient de tout temps été sujettes à des invasions. En fait, si Claude Hagège considère qu'une langue n'a pas besoin d'être écrite pour exister comme langue, une certaine définition sociologique identifie comme langue les langages qui peuvent s'écrire, qui s'utilisent dans des lieux de pouvoir, et qui ont fait l'objet d'une normalisation. On trouve autour de 6000 langues écrites et non écrites sur terre tandis que quelque 4500 répondent à la seconde liste de critères.

Finalement, en plus de la position politique sur la scène mondiale que les États-Unis ont acquise après la Deuxième Guerre mondiale, l'anglais est actuellement servi par un système de communication qui n'a évidemment jamais été égalé auparavant. **Quelque chose qui joue contre la survie de Babel**.

Article paru dans « *Le Devoir* » - Canada

" ... Balbutier à deux une langue anglaise qui n'est maternelle pour aucun des interlocuteurs, est une solution encore plus inacceptable, quand on songe que cette langue est celle des pays les plus riches et les plus puissants du monde ".

Claude HAGEGE

**"Jeepable", ou pourquoi l'espéranto est linguistiquement génial**

J'ai récemment lu cette phrase : *"on peut s'y rendre par un sentier jeepable"*.

Comme moi, vous aurez compris de quoi il s'agissait : l'auteur n'a pas voulu dire que le sentier, tel un "transformer" de dessin animé, pouvait se métamorphoser en jeep après quelques contorsions, ni que la vidange des jeeps de collection était autorisée sur le bord du chemin, mais tout simplement que ce sentier était praticable en jeep. Euh... avant tout, rassurez-moi : vous avez compris la même chose ? Ouf.

Ce n'est pas un exploit, me direz-vous, mais tout de même - si on y réfléchit, c'est assez étonnant : ce mot "jeepable", association du substantif "jeep" et du suffixe "able", ne se trouve dans aucun de mes dictionnaires, je ne l'avais jamais vu auparavant, et pourtant je l'ai immédiatement compris.

Lorsque l'auteur de cette phrase a eu besoin du concept, il a intuitivement fabriqué ce mot sur le modèle bien connu de "faisable", "incroyable", "enviable", "valable" et du classique mais bien peu galant "baisable"; après quoi, nous, lecteurs, avons immédiatement compris le néologisme.

La langue est un outil étonnant, car même si très peu de langues ont dépassé les mille ans d'existence sans être transformées au point de devenir autres, les mécanismes grammaticaux et les schémas de pensée des différentes langues ont bien des points communs. La plupart fonctionnent ainsi – du moins la plupart de celles que j'ai étudiées sur les 6000 et quelques que la Terre compte ! - par association d'idées, par juxtaposition de concepts, en faisant largement appel à l'intuition et à la contextualité (chère à la langue anglaise). Certains amateurs de langues construites souhaiteraient une langue quasi-mathématique, où un mot n'aurait qu'un sens et un seul, mais cette vision d'une langue est totalement abstraite, contraire à la réalité linguistique telle que nous la connaissons depuis des siècles, en un mot : inhumaine.

L'espéranto a ceci de génial qu'il a systématisé le fonctionnement naturel de notre esprit : ce suffixe *-able*, qui correspond en espéranto à *-abl*, est applicable à toute racine, quelle qu'elle soit, du moment que le résultat a un sens.

Et le principe s'étend à tous les affixes ( préfixes et suffixes ), comme, par exemple, "nejepebla", en français "injeepable", qui serait compréhensible aussi, quoique surprenant et de peu d'utilité. On lui préférerait probablement une périphrase, comme : impraticable en jeep.

**Comme quoi, les langues sont des objets vivants**, qui évoluent dans le sens que nous leur donnons. Les dictionnaires ne reflètent jamais qu'un instantané de la langue, chassant des termes désuets, acceptant de nouveaux vocables, même redondants comme "coach" ( entraîneur, précepteur, répétiteur, gourou, mentor, etc.). Beaucoup d'écrivains ont parsemé leur œuvre de néologismes. Dumas disait qu'... *on peut violer l'histoire à condition de lui faire de beaux enfants...*, il en est de même avec les langues. Créoles, verlan, SMS, les langues vivantes sont une matière en perpétuel mouvement, en pleine évolution sous nos yeux. Personnellement, j'aime bien "essencerie", les station-services de l'Afrique francophone, et le désormais classique "courriel" qui fait presque jeu égal avec "mél" ou "mail".

Dans la plupart des langues, les siècles ont accumulé des obstacles (sémantiques, étymologiques) à une généralisation de l'usage des affixes, restreignant notre liberté langagière. Parallèlement, il y a souvent un trop-plein, comme pour les noms de métier qui peuvent finir par "ier" ( plombier ), "-iste" ( trompettiste ), "-eur" ( chanteur ), "-ien" ( politicien ), "-ome" ( agronome ), voire d'autres finales ( astronaute, pilote, maire, militaire ).

Autre mécanisme, **la dérivation**, qui n'est pas toujours possible en français : "frère" donne "fraternel", mais "cousin" ne donne pas "cousinel", ni "cousal", ni "cousoïde". En espéranto, la dérivation ( ici adjectivale ) est systématiquement possible : "frato" donne "frata", "kuzo" donne "kuza".

